



TEA-BULTENO

1^a JARO

DECEMBRO 1998

NUMERO 10



AGENDO



- 1 M Ordigo de TEA-arkivo
- 2 M
- 3 Ĵ
- 4 V **Eksterordinara Asembleo je la 20^a horo**
- 5 S
- 6 D
- 7 L
- 8 M **Sidejo fermita**
- 9 M
- 10 Ĵ
- 11 V TAGO DE LA LIBRO kaj pri malferma tago ĉe UEA
- 12 S Slovena E-kunveno en Celije: gastoj bonvenaj!
- 13 D **ZAMENHOF-TAGO EN TEA**
- 14 L
- 15 M Ordigo de TEA-arkivo
- 16 M
- 17 Ĵ
- 18 V El nia movado: C. Piron (*Anita*)
- 19 S
- 20 D
- 21 L
- 22 M Adiaŭa vespero al 1998^a Jaro!
- 23 M
- 24 Ĵ
- 25 V
- 26 S
- 27 D
- 28 L
- 29 M
- 30 M
- 31 Ĵ



*Al ĉiuj Tea-anoj
kaj Gelegantoj
sincerajn
bondezirojn de
Bona Kristnasko
kaj Felicia Nova
Jaro 1999*



Zamenhof-Tago en Triesto

Dimanĉon la 13^{an} de decembro 1998

Ni kune honoru nian Majstron en amika kaj familia rondo. Jen ĉi-sube la programo:

- h. 10.00 Renkontiĝo en *Piazza Unità*, antaŭ la Urbo-domo. De tie ni kune piediros al la Preĝejo.
- h. 11.00 Diservo - Preĝejo de *Via Giustinelli*.
- h. 13.00 Bufedo ĉe TEA-sidejo: Gastronomia Konkurso!
- h. 15.00 Projekciado de diapozitivaj (*Anita*) pri la pasinto de TEA sed ankaŭ via!
Babila kunestado en gaja etoso!

Partoprenkosto: £ 12.000. Bonvolu antaŭanonci vin ĉe TEA-sekretario, antaŭ la 10^a de decembro: marde kaj vendrede - h. 19.30-22.00 - 040/763128 aŭ, en la aliaj tagoj, ĉe Elda: 040/763244.



La Komunuma Konsilantaro de Klosterneuburg, Aŭstrio, decidis en sia kunsido (2.10.98) distingi sinjoron

Leopold PATEK

en omaĝo de liaj meritoj pro la interpola kompreniĝo per Arĝenta Urbo-Blazono.

La transdono okazis dum festkunsido por diversgradaj distingoj la 6^{an} de novembro. La urbestro, d-ro Gottfried Schuh, menciis la meritojn de s-ro Patek por Esperanto. Interalie li parolis pri liaj funkcioj en la diversaj Esperanto-Asocioj (redaktado de AŭSTRIA FERVOJISTO, kunlaboro en E-aranĝoj, peranto de gazetoj k.a.) kaj, speciale, ke la nomo de Klosterneuburg konatiĝis mondvaste dank' al lia UEA-ĉefdelegiteco (*el ret-info*).



Esperanta Turisma Societo Ljubljana

Tavĉarjeva 2
1001 Ljubljana

Decembra programo - ĉiuĵaŭde je la 19.30 h.

- 03.12.98 La naskiĝtago de d-ro Prešeren
- 10.12.98 Zamenhofa vespero
- 17.12.98 ekde la 19^a horo: ni kune adiaŭu la malnovan Jaron (interŝanĝo de donacetoj kaj tostado)

Tie kaj tie pluketante...

Zorge de
Elda Daerfler

Ĉu vere Babelo ne plu ekzistas?

En la septembra numero de TB, aperis artikolo kiu prezentis la iom-post-ioman malaperon elde la monda scenejo de ĉiam pli granda nombro da lingvoj, kio supozigas je onta solvo, en relative malmulta tempo, de la problemo pri lingva interkomunikigado, kaŭzita de niaj praaĵoj per la konstruo de tiu malbenita Babela turo. Jes, en si mem la problemo ne plu ekzistos, ĉar oni prognozas malaperon de milo da idiomoj: ĉu iam envere la homaro parolos ununuran lingvon?

Do, tia katastrofo ja povus eĉ prezentiĝi, sed aktuale ni daŭre baraktas en senfinaj miskomprenoj kaj sentas nin surdaj-mutaj antaŭ alilingvano. Tamen la lingva Babelo iukaze povas favori kelkajn homojn: *Ekster-eŭropanoj, Babelo povas helpi vin superruzi la italajn leĝojn!* - tiel tekstis la titolo de artikoleto, aperinta en la ĉiutag-jurnalo IL PICCOLO de Trieste, pasintmonate. Kio okazis? Granda problemo estiĝis pro la laŭlitera interpretado de iu leĝo, ĉi-jare promulgita, rilate al la elpelo de kaŝ-enmigrintoj. En du nord-italiaj urboj okazis, ke la distriktaĵoj nuligis la dekretojn de siaurbaj prefektoj, motivante tiele sian agmanieron: *La dekretoj ne estis skribitaj en la lingvoj de la elpelotoj aŭ almenaŭ en la angla, franca aŭ hispana lingvoj, kiel ordonas la leĝo 40, jaro 1998: tial la elpelotoj estas nuligitaj.* Sekve de tio la sindikato de la Policistoj sin demandas: Kion oni devas fari, kiam prezentiĝas civitanoj ĉinaj, nepalaj aŭ el Ganao? Kiamaniere trovi interpretiston por tiuj homoj, kiuj konas nek la anglan nek la francan nek la hispanan? Kiel konduki kun tiuj homoj? Se oni devas rigide apliki tiun leĝon, oni ne plu povos elpeli iun ajn. Tiu leĝo favoras fakte tiujn homojn kiuj kaŝeniras nian landon, kontraŭ kiuj oni ne havas leĝajn armilojn por ilin akompani al la landlimo.

Estas vere, ke en Prefektejoj tute ne ekzistas interpretistoj aŭ tradukistoj scipovantaj tiom da lingvoj kiom da diversaj naciecoj havas tiuj kiuj klopodas eniri Italion. Kie oni povas trovi kompetentajn interpretistojn por lingvoj kiaj la araba, svahila kaj eĉ albana? Kaj plie - eble plej pripensinda - el kiuj putoj oni ĉerpu monon por pagi tiom da interpretistoj kaj tiom da tradukistoj? Notindas ke por ĉiu kazo de kaŝ-enirinto oni devas redakti plurfolian skriban raporton (*ne nur en la itala, sed ankaŭ en la lingvo de la elpeloto, aŭ almenaŭ en unu el la tri oficialaj lingvoj supre indikitaj!*).

Ĝis kiam oni ne trovos respondon al tiom da demandoj, dependos nur de la unuopula inteligento aŭ menslarĝeco la rigora aŭ nestrikta observado de la leĝo pri kontraŭleĝaj enmigrintoj. Sed ekas ĉiu-kaze dilemo: se ne aplikiĝas strikte tio kion diktas la leĝo, tio signifas ke ĝuste tiuj kiuj devus respekti ĝin plej severe, agas kontraŭleĝe, do iĝas mem krimuloj; malakaze, ili faciligas kaj iasence protektas la kaŝitecon de tiuj ekster-eŭropkomunumanoj, devigante propran Landon alfronti konsekvencon problemaron, ja tre bone konatan de ĉiu.

La fina konsidero povas esti tre amara, ĉar estas konate, ke Italio fariĝis fabellando ĉefe pro la fakto ke ĝi havas leĝaron tra kies retmaŝoj oni povas trovi eskapon. Ekzistas tamen epizodoj mirŝokantaj, kiel okazis kiam

oni monpunis vendistojn, ĉar ĉi tiuj ne transdonis la fiskan kvietancon al infanoj, al kiuj oni donacis glaciaĵon aŭ bombonojn. Sed kiam la problemo estas serioza, ekz. kaŝa eniro de ekstereŭrop-komunumanoj, oni ne plu scias kion fari. Tiu leĝo krome evidentigas kiom ĉiam pli malfacile estas trovi justan solvon fronte al la lingvoplur-eco, kaj ĉi-okaze ne sur internacia, eksterlandlima, kampo, sed eĉ en propra hejmo.

La itala lingva problemo

PIER GIORGIO SORANZO

En delikata momento, kiam Italio riĉiĝas je aliaj popoloj, permesu al mi doni rapidan rigardon al la situacio de la itala lingvo. En la kajero 551, novembro 1998, de la monata revuo *LETTURE* (LEGINDAĴOJ), aperis interesa artikolo pri tiu ĉi problemo.

Ĝenerale, la lingvo de iu nacio ligas la koncernajn loĝantojn, ĉar ĝi estas senpera ilo de interkompreniĝo. Sed por ke tiu ilo bone, konstante kaj senpere funkcii, estas necese, ke la Ŝtato protektu ĝin. En la Itala Konstitucio estas skribite, ke la Ŝtato protektas la pejzaĝon, la minoritatajn lingvojn ktp, sed eĉ ne unu vorto estas dirita por protekti la nacian lingvon: ne estas skribite, ke la itala estas la oficiala lingvo de Italio!

Se ni turnas la okulojn al Francio, ni rimarkas, ke en la tiea Konstitucio estas skribite, ke la oficiala lingvo de Francio estas la franca: ĉiuj oficialaj dokumentoj, publikaj anoncoj ktp devas esti en la franca.

Ĉe ni, la lingva problemo akriĝis de antaŭ kelkaj jaroj, nome de kiam, post la disfaligo de la berlina muro, Italio fariĝis konkera tereno de slavoj, albanoj, afrikanoj, azianoj, ktp. Spite tion, la itala Ŝtato ne organizas sufiĉe nombrajn lingvokursojn por tiuj ĉi enmigrintoj, malhelpante, tiamaniere, ne nur la vojon al la integriĝo, sed ankaŭ forgesante la protektadon de la itala.

Sendube la franca leĝo estas tro rigora; en Italio sufiĉus pli elastaj reguloj kiuj, finfine, klarigu ke la itala estas la oficiala lingvo de Italio.

Tre interesa letero legeblas en la FEI-organo L'ESPERANTO, n° 7 - septembre 1998, subskribita de Davide Astori: temas pri la eblo, ke la eldonejo VALLARDI, siatempe eldoninta la konversacian manlibreton PARLO ESPERANTO, zorgu la publikigon de poŝformata vortaro it-esp/esp-it, kiel parto de plurlingva serio. Ĉi tiu nuna oportuno de disvastigo tra la tuta nacia teritorio de esperanta eldonaĵo estas absolute nemaltrafebla. Davide Astori pretas prepari ĝin tute senpage, kunlabore kun d-ro Broccatelli, sed la problemo estas, ke laŭ la eldonista kontrakto oni devas aĉeti 1000 ekzemplerojn je duonigita prezo. Entute estas 10 milionoj de liroj.

Do, certe temas pri konsiderinda sumo, sed tamen oni devas prikonsideri la sendubajn, sekvajn avantaĝojn. Ni pripensu serioze pri tio kaj prezentu niajn proponojn. TRIESTA ESPERANTO-ASOCIO metas je dispono monsumon por aĉeti 20 librojn. Ni eliru el nia fomitejo kaj kaptu ambaŭmane ĉi tiun ŝancon.

BULTENO de la membroj de
TRIESTA ESPERANTO-ASOCIO

Sidejo: Via Crispi 43 - 34125 Trieste
tel/fakso: +39 040 763128; reto: nored@iol.it
Poŝta adreso: CP 601 - IT-34100 Trieste Centro
Poŝtĉekkonto N° 10834349